PENSEO*80

jun.1998

ENHAVO

BABILADO EN POEZIA ĜARDENO (11) [Bril Jadov]*

POR PLI BONE KOMPRENI [Kurisu Kei] *

Preĝejoj Multas [Laŭlum] *

TELEFONADA AMINDUMO [Liu Guofang/trad.Cesinio] *

ALKEMIO [Mao Zifu] *

Ĉu Vere Senrevide ? [Even] *

Bril Jadov (1941-)

BABILADO EN POEZIA ĜARDENO (11)

— Fojfoje oni esprimas drastan amon per insulton.

— " Ho, mia kara, vi estas vipuro, ĉiesulino, kanajlino, bufino..."

— Por bufo la plej bela estas bufino.

— Absurde !

— Ne, kvankam relative.

Fragila vizaĝo larmojn apenaŭ elportas,

longaj brovoj tre sentemas pri ĉagrena ondo.

vi, kanajla lun', la urbon Yangzhou tiom tordas,

preskaŭ ne rompante la obskuron en la mondo !

La luno, karulino de Li Bai, jam kanajlas tie ĉi ?

Jen poemo de Xu Ning, vivinta inter la fino de la sepa jarcento kaj la komenco de la oka.

Tiu ĉi poemo famas ĝuste pro la kanajligo de la luno. Mi faru laŭvortan interpreton :

Xiaoniang-a vizaĝo pro maldikeco malfacile subtenas larmojn,

persikfoliaj brovoj pro longeco facile rimarkas malĝojon.

Sub la ĉielo tri fenoj de l' klara luno en la nokto,

sed du fenoj de ĝi kanajle restas en Yangzhou.

— Mi mem restas en obskuro !

— Momente ! Baldaŭ vi vidos la lumon.

Tiuepoke poetoj kutime nomis iun ajn virinon Xiaoniang (ŝjaŭnjang) kaj viron Xiaolang, precipe en la tempo de dinastio Tang. Xiaonianga vizaĝo do vizaĝo de iu fraŭlino. Ŝia vizaĝo estis tiel "maldika", ke ĝi facile dissxirigas pro larmado.

Persika Folio, ĉine Taoye(taŭ-je), estis favorata kromedzino de Wang Xianzhi(vang ŝjanzi, 344-386), fama kaliggrafo. La brovoj, similaj al tiuj de Persika Folio, tiel longaj, povas akre senti malĝojon.

Feno estas unuo de longo kaj unu el rgalaj partoj de io. Nu, oni trionigu la lunon, la luno do dividiĝas en tri egalajn partojn, do tri fenojn. Sed la "Kanajla" luno donus du partojn al Yangzhou, prospera urbo situanta en la nuna provinco Jiangsu (ĝjangsu), ĉe Yangzi-rivero.

La originaleco de la poemo kuŝas en tio, ke la aŭtoro neniam parolis pri sia ĉagrena sopiro, sed pri tio, ke ŝia vizaĝo, tiom fragile delikata, apenaŭ povas elporti frotadon fare de larmaj gutoj, kaj ŝiaj longaj brovoj havas subtilan sentemon, tiel ke apenaŭ ĉagreno kaj tristo nubigas la vizaĝo, ili kuntirigzas deformigante.

La kuriozeco de la poemo montriĝas per tio, ke la aŭtoro aŭdace insultis ke la luno estas kanajlo. Vi, lunaĉo, kanajlo ! kial vi donas du trionojn el viaj briloj al la urbo Yangzhou !

Ha ha ! Post via longa predikato mi fine vidas la lumon, bedaŭrinde ne de la luno. La urbo Yangzhou estas ĉarma, tiom pli en luna nokto.

Fine ! Kaj mi finas.

Kurisu Kei(1908-)

POR PLI BONE KOMPRENI

(daŭrigo de p.314)

(11)Vaclav Vydra (1876-1953) la patro kaj Vaclav Vydra la filo (1902-1979). Ambaŭ estis aktoroj. La patro estis ankaŭ teatra reĝisoro.

(12) Karel Dostal (1884-1966). Aktoro kaj reĝisoro.

(13) Jiri Frejka (1904-1952). Reĝisoro kaj teatra teoriulo.

(14) Multelementulo. Laŭvorta traduko de ĉeĥa mnohozivernik(mnoho-zivel-nik-mult-element-ulo).

(15) Jan Bor (1886-1943). Fucik karakterizis tiun ĉi "multelementulo", ĉar li estis reĝisoro, dramisto, teatra direktoro, pedagogo, eseisto, publicisto, tradukisto ktp en unu persono.

(16) Fucik provis konfuzi kaj erarigi Gestapon per aludo, ke li sekrete kontaktis en Prago Jan Svermann, kiu estis la ĉefredaktoro de "Rude Pravo", dum KPĈS ankoraŭ agadis lauxleĝe, kaj kiu estis tiam en Moskvo. Sverma estis la due plej grava persono en KPĈS post Klement Gottwald, ĝia prezidanto, kiu tiam troviĝis en Moskvo same kiel li. Kvankam tio estis apenaŭ kredebla por Gestapo, tiu ĉi tamen avide ekkaptis tiun logaĵon, ĉar se Sverma vere revenintus en Ĉeĥion sekrete por rekte gvidi surloke la kontrauxnazian rezistadon de KPĈS, tio estas grava minaco por la tuta nazia okupaci-reĝimo en gci. Cetere, Sverma servis kiel atestanto, kiam en junio 1938 Fucik kaj Gusta oficiale geedzigis en Prago.

(17) Bozena Pulpanova (1900-1968) Aktorino.

(18) Jindrich Elbl (1902-1969). Produktoro de kurtaj filmoj.

(19) Hausarbeiter, germadevena vorto, kiu signifas laŭvorte :domlaboranto. En Ĉeĥio ĝi siatempe signifas prizonulon, kiu helpe laboris por gardistoj kaj esploristoj. Ankaŭ Fucik dum kelka tempo laboris kiel "hausarbeiter".

(20) Temas pri la konstruajo en Prago, kiu fariĝis dum la nazigermana okupacio (1939-1945) la sidejo de Gestapo, la sekretpolico. Pli frue gi estis banko kaj Petschek estisla nomo de ĝia posedanto. Ĝin oni nomis siatempe Petschekpalaco pro ĝia relative pompa stilo.

Kial Rudolf Slansky, la ĝenerala sekretario de KPĈS, ordonis al Gusta Fucikova forstreki ankaŭ tiun parton ? Miaopinie tial, ke por la gvidantaro de KPĈS ne estis dezirinde, ke la legantpubliko eksciu ke Fucik rompis sian 3 semajnan silentadon kaj komencis respondi al la esplordemando de Gestapo, ĉar laŭ ĝi komunista heroo kiel Fucik devas nepre silentadi ĝis la fino. Ĝi ne komprenis la elastan taktikon, kiun prenis Fucik por savi ne sin, sed per forlogo de la atento de Gestapo al Sverma almenaŭ la gravajn intelektulojn, kiuj estis necesaaj ne nur tiam,sub la nazigermana okupacio, sed precipe post la mlito.

Nun estas malfacile juĝi, ĉu tiu ĉi taktiko de Fucik sukcesis aŭ ne. Sed la faktoj montras, ke la ĉeĥaj intelektuloj, kiujn Fucik mencias en tiu parto de "Riporto", ĉiuj supervivis la okupacion kaj ludis postmilite gravajn rolojn escepte Jan Bor, kiu mortis la 25-an de marto 1943, kvankam li mem devis morti la 3an de septembro 1943 en Berino ekzekutite de la nazioj. Kaj Jaroslav Seifert, la poeto, eĉ povis ricevi la literaturan Nobel-Premion en 1984, la unua en Ĉeĥio.

Laŭlum (1923 -)

Preĝejoj Multas

Preĝejoj multas en Usono,

ĉu el granito aŭ betono.

Bibli' abundas pli ol ĉio.

Ĉu vere tronas tie Dio ?

Reale regas la Mamono

kun ĉia lukso en dispono.

La povraj preĝas ja en pio,

plu triste vivas en socio.

Ne mankas en Usono riĉo,

sed ankaŭ murdas malfeliĉo.

Se l' homoj vere estas fratoj,

do devus peni por dediĉo

de ĉiuj fortoj por bonstato

de l' familioj en ĉiuj ŝtatoj.

EL poemserio USONO

Liu Guofang

TELEFONADA AMINDUMO

(novelo)

Ĉiutage knabo alvenis al la telefonbudo de Salika por telefoni sian amikinon. Li kutime kroĉis la telefonilon ĉeorele, butonumis la numeron 0794227155 ciferon post cifero, kaj ekparolis al la mikrofono :" Saluton ! Parolas Ljuĉjo. Mi ĉi tie vin sopiras. Kial? Ĉar mi amas vin, vere mi amas vin, pensas pri vi ĉiumomente. Ĉu vi scias ?"

Komence Salika ne rimarkis la knabon, nur pro oftiĝo de la okazaĵo, ke ŝi lin priatentis. Tuj kiam la knabo eniris, Salika puŝis al li unu el la du telefooj, kaj al si en la kapo ruliĝis la parkeritaj frazoj:

" Saluton ! Parolas Ljuĉjo. Mi ĉi tie vin sopiras. Kial ? Ĉar mi amas vin, vere mi amas vin, pensas pri vi ĉiumomente. Ĉu vi scias ?" Kiel atendite, la knabo elbuŝigis tiujn samajn frazojn post butonumado de la ciferoj. Salika sekve kaŝridis al si en la koro. Unufoje, subridinte, ŝi ekkovris sian buŝon, aldirante la knabon, "Kiom arde pasia vi estas !"

"Mi vere ŝin amas." jesis la knabo.

"Ŝi ja feliĉas kun tia amema amanto." rimarkis Salika.

Aŭdinte tion, la knabo foriris beatmiene.

Poste, la knabo daŭre venis ĉiutage, same akurate, same koncize, kun tiuj frazoj. Tamen, foje li eldiris ion pli. Litaniinte " ĉiumomente mi pensas pri vi, mi amas vin", li aldonis:" Vi ligas vian hararon per ruĝa poŝtuko hodiaŭ, ĉu ne ? La poŝtuko ligiĝas en banto papiliforma, vere ĉarme ! Vi eĉ pli belas !"

Tiam sur la kapo de Salika ankaŭ flirtis ruĝa poŝtuko. Kiam la knabo aŭdigis tiujn vortojn,Salika etendis sian manon al la kapo kaj iom ĝin tuŝetis. Post kiam li demetis la telefonilon, Salika ekdemandis :" Ĉu ankaŭ ŝi havas ruĝan poŝtukan banton surkape ?"

La knabo kapjesis.

"Vi vere tion vidis ?" Salika demandis plu.

"Jes, mi vidis. Same kiel vi, ŝi havas rugan poŝtukon ligitan al la hararo. " konfirmis la knabo.

Poste, la knabo daŭre alvenis ĉiutage por fari telefonadon, absolute sinkoncentre, enamiĝinte.

Sage forflugis aŭtuno. Jam vintre. Salika sin vestis per dika lanugjako.

Tiutage rutine alvenis la knabo. Levante la telefonilon kaj ripetinte tiujn frazojn, li aldonis :" Froste nun, vi vestiĝas per lanuga jako, cxu ne ? Sed la frido ankoraŭ vin ĝenas. Mi vidas, viaj lipoj purpuriĝas pro la frido. Vi devas surmeti ĵerzon aldone."

Tion aŭdinte, Salika surpriziĝe montris sin kortuŝita.

Post la foriro de la knabo, Salika surmetis ĵerzon aldone, kaj sidadis tie, kvazaŭ entrancata. Ŝi jam pensis al si, ke tiu knabino ja tre felicxas, amate de tiom amema knabo. Sed, kiel aspektas tiu feliĉulino ? Tion Salika ne sciis.

Salika tre scivolemis.

Tion elpensinte, Salika ekveturis al Fuzhou, distance je 100 kilpmetroj, ne tro malproksime, ner per vojaĝo de 2.5 horoj por aŭtobuso.

Elaŭtiĝinte, Salika tuj pafis sin al la Telekomunika Buroo por pridemandi la telefonnumeron 227155, sed tiea oficisto diris, ke ne ekzistas tiu numero efike.

"Vi ne misis ?" dube enketis Salika, "certigu tion." La oficisto plurfoje kontrolis kaj definitive ŝin informis :"Tio ja estas senabonata numero."

Salika ion ekkonsciis.

Reveninte, Salika butonumis ciferojn 0794227511 sur telefonaparato

Ŝi ne povis mismemori. Tute koincida respondo. Aŭdiĝis voĉo el la aparato :"Ĉi tiu estas senabonata numero. Bonvolu rediskumu post eltrovo de la ĝusta numero."

Ĉio lumiĝis al Salika.

La knabo ankoraŭ venis por telefoni, butonumis la numeron 0794227155, kaj montris sin enamiĝanta. Vidante tion, Salika sentis siajn okulojn malsekiĝantaj.

Iutage, Salika alvenis en la Telekomunika Buroo kun la peto, ke oni ŝanĝu la numeron de unu el siaj du telefonoj al 227155.

Sekvantatage, ree venis la knabo.

Kiam li ekbutonumis la numeron, Salika kovris la butonon de la cifero 0 kaj indiktis :"Ne butonumu la regionan numeron !"

Konfuziĝis la knabo.

"Butonumu, ne la regionan, nur 227155." diris Salika. La knabo kompleze tion akceptis.

Tuj eksonis la alia aparato en la budo, "tin,tin,tin..." Ekmiris la knabo.

Ĵetante rigardon al la knabo, Salika ridetis kaj aplombe eklevis la telefonilon, "Ekparolu," ŝi elspiris.

Post momenta silento la knabo parolis al mikrofono, kun mirega ekstazo, "Mi amas vin..."

elĉinigis Cesinio

Mao Zifu (1963 -)

ALKEMIO

sub blua volbo

verda kvieto regas super lirlo.

kvazar' maniatura

etendiĝas sur komforto.

nulo sen vanto.

livo rigardas dekstron

for de miopoj aliaj.

suĉu la kvintesencon,

aspergi la kvar elementojn.

bolas la forno.

sublimiĝas nigro grizo flavo ruĝo

kaj glaĉero.

el-iks-iro prepariĝas

eko naskas adon.

menso ne celu

alies paton.

ĉe sia tripiedo

ekspluatito ne bezonas

reteni elanon.

la ŝnuro komunika

tondita aspiras regeneracion.

aldonu flogiston: ne

denton pro dento !

sepdekoble sepu kvardek tagojn.

elpumpu la lastan fulgon.

pong ! miraĝo el vako.

el la atomoj rezultas

kolomboj ne bombo.

PAĜO DE ĈINESKO

Even(1963-)

Ĉu Vere Senrevide ?

—Laŭ ĉinesko Yumeiren

Ŝtona temp' disigas nin.

Vi forgesos min ?

Triste ni ambaŭ mutas,

kaj nur senĉese larmo gutas...

Al vi donis l' am-tuton,

sed ne sentludon.

Ĉio glitos fulme for,

eĉ la kortuŝa pase-memor'.

YUMEIREN:ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,5;7,9 silaboj, laŭ para rimo : a,a;b,b;c,c;d,d.

返回目录